

Johannes R. Becher,  
**Nigraj veloj super la Bodeno**  
*tradukita de Manfred Retzlaff*

Foje iras veloj tra la land',  
 foje jen boatoj sur herbejoj.  
 Nigraj veloj sur monteto-rand',  
 kaj fluantaj estas la verdejoj.

Tra l' fragmit' en vent' lulanta sin  
 Estas ili kaše forglintintaj,  
 Staras jen la nigraj veloj pintaj  
 Meze sur la mar' en vent' je l' fin'.

Muelilo tie sin vidigas,  
 Kaj jen suprenigas nigra vel',  
 La flugilojn ĝi jam surombrigas  
 Songe antaŭ la vesper-ĉiel'.

Sin foršovas kvazaŭ forblovite  
 Nun la lando kaj malfermas sin  
 En vesper-sunbril' la mar' medite.  
 Jen nigraj veloj ĉe la vido-fin'.

...

Johannes R. Becher,  
**Schwarze Segel überm Bodden**

Manchmal gehen Segel übers Land.  
 Manchmal ziehen Boote über Wiesen.  
 Schwarze Segel überm Hügelrand,  
 und die Wiesen sind ein grünes Fließen.

Durch das Schilf, das leis im Wind sich wiegt,  
 Sind sie heimlich unserm Blick entglitten,  
 Und dann stehn die Segel wieder mitten  
 Auf dem Meer, schräg an den Wind geschmiegt.

Eine Mühle steht dort auf dem Hügel,  
 Und ein schwarzes Segel steigt empor,  
 Und schon überschattet es die Flügel  
 Und zieht traumhaft hinter ihnen vor.

Wie verweht schiebt sich das Land zur Seite,  
 Und versonnen, abendlich besonnt,  
 Öffnet sich das Meer in seiner Weite ...  
 Schwarze Segel stehn am Horizont.

...

Traduko de la Germana poemo “Schwarze Segel überm Bodden” de JOHANNES R. BECHER (\*1891-05-22 – †1958-10-11) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2004-03-04.

MR-423-1 / Arg-798-1601 (2013-01-30 22:11:10)

Bodeno, germana: Bodden, estas malprofunda akvejo disigita de la maro per insuloj aŭ terlangoj ĉe la bordo de la Balta Maro en Meklenburgio kaj Pomerujo. Pri la poeto vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Johannes\\_R.\\_Becher](http://de.wikipedia.org/wiki/Johannes_R._Becher).

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANNES R. BECHER (\*1891-05-22 – †1958-10-11).

Arg-798-1600 (2013-01-30 22:08:28)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi strofon en la gazeto “Ostseezeitung” (= Baltamara Gaze-to), semajnfina eldonaĵo de l' 7./8. de Aŭgusto 2004, en la artikolo “Darßer Gedichte ohne Illusionen” (= Darsaj poemoj sen iluzioj) de M. Schümann. Ĝi estas trovebla en la poem-libro “Wolkenloser Himmel” (= Sennuba ĉielo), eldonita en 2004 de s-ro Jens-Fietje Dwars, eldonejo Quartus, Germanio.